Gmail Paulo Pires <flugfolio.xyz@gmail.com>

# ESPERANTO NOTÍCIAS

1 mensagem

**esperanto@easp.org.br** <esperanto@easp.org.br> 20 de dezembro de 2025 às 10:01
Para: Esperanto <esperanto@easp.org.br>


## INFORMATIVO DA ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO

easp
Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

http://easp.org.br – Redação: Paulo S.Viana

**20 de Dezembro 2025**

**EDITORA LORENZ: 50 ANOS!**




Em 13 de dezembro de 2025 comemorou-se no Rio de Janeiro um acontecimento extraordinário: a Sociedade Editora Lorenz completou 50 anos de atividade fecunda e ininterrupta. Dezenas de Esperantistas e simpatizantes se reuniram na sede histórica da Federação Espírita Brasileira para relembrar e reforçar seu apoio a esta entidade única no mundo. A Lorenz tem por objetivo a divulgação do Esperanto ao público espírita e do Espiritismo aos Esperantistas do mundo inteiro. Para isso, edita livros em Português e em Esperanto. Distribui gratuitamente obras em Esperanto a Esperantistas de todas as partes do mundo, participa ativamente dos congressos mundiais de Esperanto, edita anualmente o Almanaque Lorenz e o boletim virtual “Komunikoj”. No momento, depois de décadas de administração cuidadosa, está construindo sua sede própria no Rio. Fundada em 1975 por um grupo de idealistas, entre os quais se destacou o pioneiro Délio Pereira de Souza, ela se mantém pelo esforço do trabalho voluntário e de doações da comunidade Esperantista.

O movimento Esperantista se caracteriza por total neutralidade em relação a religião, política e demais visões do mundo. Todos são bem-vindos. Outros movimentos religiosos, como a “Oomoto”, no Japão, o movimento Bahai, de origem persa, o movimento católico e o protestante, têm usado o Esperanto para a divulgação de suas ideias. E todos convivem fraternalmente.

***ELDONEJO LORENZ: 50-JARA!***

*Je la 13-a de decembro 2025 oni festis en Rio-de-Ĵanejro eksterordinaran okazon: Eldonejo Lorenz kompletigis 50 jarojn da senĉesa, fekunda agado. Dekoj da Esperantistoj kaj simpatiantoj kunsidis en la historia sidejo de Brazila Spiritisma Federacio por rememori kaj konfirmi sian apogon al ĉi tiu unika organizo en la mondo. Lorenz havas kiel*

*celon la diskonigadon de Esperanto al spiritistoj kaj de Spiritismo al Esperantistoj, en la tuta mondo. Por tio, ĝi eldonas librojn en la portugala lingvo kaj en Esperanto. Ĝi senpage disdonas verkojn en Esperanto al Esperantistoj en la tuta mondo, aktive partoprenas en universalaj kongresoj de Esperanto, ĉiujare eldonas Almanakon Lorenz kaj la virtualan bultenon "Komunikoj". Nuntempe, post dekoj da zorgoplena administrado, ĝi konstruas sian propran sidejon en Rio . Ĝin fondis en la jaro 1975 grupo da idealistoj, inter kiuj elstaris Délio Pereira de Souza, kaj ĝin subtenas volontula laborado kaj donacoj de la Esperantista komunumo.*

*La Esperanta movado estas tute neŭtrala rilate religion, politikon kaj aliajn vidpunktojn pri la socio. Ĉiuj estas bonvenaj. Aliaj religiaj movadoj, kiel "Oomoto", en Japanujo, la persdevena Bahai, krom la katolika kaj la protestanta movadoj, uzas Esperanton por diskonigado de siaj ideoj. Kaj ĉiuj frate kunvivas.*

**O MOVIMENTO ESPERANTISTA E OS DIREITOS HUMANOS**




Em 10 de dezembro se comemorou o Dia Internacional dos Direitos Humanos. Representando os falantes da Língua Internacional em todo o mundo, a Associação Universal de Esperanto, com sede em Roterdã, na Holanda, emitiu nota enviada à ONU, com a qual tem relações consultivas. No texto, lê-se:

"Reafirmamos sempre, como consta na Declaração Universal dos Direitos Humanos, nossa firme crença na dignidade e no valor da personalidade humana e nos direitos iguais das pessoas, independente de raça, cor da pele, sexo, língua, religião, política ou outras opiniões, origem nacional ou social, posses, nascimento ou outro fator. (...) Em especial, chamamos a atenção para os direitos linguísticos (...) Trabalhemos contra a discriminação linguística. Todos têm o direito de participar de comunidades linguísticas, usar, proteger e fazer avançar seus idiomas. Do mesmo modo, todos têm o direito de usar várias línguas e se comunicar em comunidades de várias línguas." https://esperantoporun.org/eo/tago-de-homaj-rajtoj-2025/.

***ESPERANTOMOVADO KAJ HOMAJ RAJTOJ***

*Je la 10-a de decembro oni festis la Internacian Tagon de Homaj Rajtoj. Kiel reprezentanto de la parolantoj de la Internacia Lingvo en la tuta mondo, Universala Esperanto-Asocio, kun sidejo en Roterdamo, en Nederlando, eldonis noton kaj ĝin sendis al U.N., kun kiu ĝi havas konsultajn rilatojn. En la teksto, oni legas, interalie:*

*"Ni daŭre kaj kolektive reasertas, kiel aperas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, nian firman kredon je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de homoj, sendepende de raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato. (...). Ni laboru kontraŭ lingva diskriminacio. (...) Ni speciale atentigas pri homaj lingvaj rajtoj.(...) Ĉiuj rajtas partopreni en lingvaj komunumoj, uzi, protekti kaj antaŭenigi siajn lingvojn. Same, ĉiuj rajtas esti plurlingvaj kaj interparoli kun pluraj lingvaj komunumoj." https://esperantoporun.org/eo/tago-de-homaj-rajtoj-2025/.*

**ESPERANTO - A VERDADEIRA LÍNGUA INTERNACIONAL**